Plenumante la decidon de la Tria Kongreso, D<sup>ro</sup> Zamenhof, elektis komitaton de sep membroj por proponi daton por la tutmonda festotago, principe jam akceptita de la kongreso.

Jen la provizoraj proponoj de la komitatanoj:

Nia Majstro proponas:

- la daton de 17<sup>a</sup> de Decembro (dato, de la unua festo esperantista en la jaro 1878);
- la tagon de la printempa (por la suda hemisfero = autuna) tagnoktelegaleco, kiu povus servi kiel simbolo al la neŭtraleco por la tuta homaro.

La Majstro aldonas, ke tiu provizora opinio ne havu ian influon ĉe la decido.

Al la dato de la 17<sup>a</sup> de Decembro aliĝas Sinjoroj Codorniu kaj Pollen, al la dato de la 21<sup>a</sup> de Marto Sinjoroj Montrosier kaj Simon. Sinjorino Hankel timas ke tiuj datoj estas tro proksimaj al la kristnaska respektive, kelkafoje al la Paska festo. Ŝi kaj Sinjoro Tabenski de nove proponas la 21<sup>a</sup> de Julio. Tiun daton S<sup>ro</sup> Tabenski jam antaŭ kelkaj monatoj proponis en « Tra la Monde », kiel festotagon de la dudeka jubileo de la momento, « Kiam nia Majstro transiris la Rubikon », kaj efektive multaj Esperantistoj festis tiun daton. Nia majstro aldonas ke laŭ lastaj esploroj, faritaj de li mem, montriĝis ke:

- La dato en kiu la unua libro pri Esperanto ricevis la cenzuran permeson, estis ne la 21<sup>a</sup> de Julio, sed la 2<sup>a</sup> de Junio (- 21<sup>a</sup> de Majo laŭ rusa kalendaro)
- El ĉiuj aliaj datoj koncernantaj la komencon historion de Esperanto, kun plena precizeco estas konata nur la dato de la 17<sup>a</sup> de Decembro 1878.

En la nomo de la komitato, kies sekretario mi estas, mi havas la honoron peti la esperantistan gazetaron, ke ĝi bonvole represu tiun raporton kaj invitu iliajn legantojn sendi al mi, kiel eble plej baldaŭ, iliajn opiniojn. El tiuj leteroj ricevojtaj mi faros raporton por la komitatanoj, kiuj poste voĉdonos definitive. La Kvara Kongreso estos petata je ĝia lasta sankeio.

Kun esperantista saluto.

Prof. OTTO SIMON.

Se festotago estas necesa por la Esperantistaro, ni opinias ke la tagnoktelegaleco (21<sup>a</sup> de Marto) estas la momento la plej oportuna por ĉiuj samideanoj de la du terastraj hemisferoj. Pri la dato de 21<sup>a</sup> de Julio ni jam diris ke tiu tago malebligus por ni Belgaj la feston pri datreveno, ĉar ĝi okazus samtempe la nacia festo kaj malaperus inter la aliaj oficialaj festoj.

## KRONIKO DE LA GRUPOJ.

**Bruxelles.** — Le commandant Ch. Lemaire, président de la Ligue Espérantiste Belge, a conféré le 9 décembre à l'Université populaire de Schaerbeek-lez-Bruxelles et le mercredi 11 décembre au groupe « L'Émancipation » à la Maison du Peuple de Bruxelles.

Il a récolté le succès auquel il est habitué, et dès maintenant c'est une chose certaine, nous pouvons annoncer qu'un cours commencera bientôt à Schaerbeek, nous n'attendons plus que les indications au sujet du local et de l'heure du cours.

**Ixelles.** — Le cours de Mademoiselle Cl. Simon à l'école de « la petite Suisse » réussit comme aucun cours n'a réussi. 240 élèves, y assistent assidûment; naturellement il n'est pas aisé de donner l'enseignement à un tel auditoire!

**Marcinelle.** — Dimanche, 1<sup>er</sup> décembre, a eu lieu à Marcinelle-lez-Charleroi, une conférence de notre ami dévoué Cardinal.

Grâce à M<sup>r</sup> Destrée, le membre du Parlement bien connu qui s'est toujours volontiers occupé de l'instruction du peuple, la conférence a eu lieu dans la salle des fêtes communale. Au moins 200 personnes y assistèrent et écoutèrent avec grande attention l'habile et spirituel conférencier qui présenta avec art notre belle langue aux Marcinellois.

Souvent l'orateur fut interrompu et applaudi longuement, surtout lorsqu'il parla du Congrès de Cambridge; tous les assistants étaient enthousiasmés.

Après la conférence, M<sup>r</sup> Destrée remercia et félicita M<sup>r</sup> Cardinal. Il annonça l'ouverture d'un nouveau cours, donné par M<sup>r</sup> Mayer, et quantité de personnes s'inscrivèrent sur le champ.

Enorme succès pour notre cause.

**Boom.** — Un groupe espérantiste s'est fondé à Boom, la petite ville industrielle de la province d'Anvers. Les membres sont déjà une vingtaine et ce nombre grandira bientôt, grâce au cours organisé en son sein; le professeur est M<sup>r</sup> Mathys du groupe de Duffel.

**Namur.** — Un nouveau groupe est né à Namur qui sera bientôt la ville qui aura le plus de groupes. Quelques anciens espérantistes l'ont fondé; les membres sont au nombre de 17. Le nouveau-né organise deux cours; le dimanche à 11 heures du matin et le samedi à 8 heures du soir. Le local du groupe est aussi: Hôtel de Hollande, comme le groupe de la garnison.

**Charleroi.** — Grâce aux efforts de quelques adeptes dévoués, la fondation d'un groupe dans la cité carolorégienne a bien réussi, et dès maintenant son succès est assuré. Dès le 2 décembre les cours ont commencé et 45 élèves ont assisté à la première réunion. Les cours ont lieu tous les lundis à 7 1/2 heures du soir et chaque dimanche à 9 1/2 h<sup>s</sup> du matin dans les locaux de l'Athénée Royal, prêtés grâce à l'appui de l'édilité.

**Bruxelles.** — Komandanto Ch. Lemaire, prezidanto de la Belga Ligo Esperantista paroladis dum la 9<sup>a</sup> Decembro ĉe la Universitato Popola en Schaerbeek apud Bruselo, kaj dum la merkredo 11<sup>a</sup> Decembro ĉe la grupo « L'Émancipation » (Liberigeco) en la Domo de l' Popolo de Bruselo.

Li rikoltis saman sukceson, kiel kutime, kaj de nun esta afero tute certa, ni povas anonci ke kurso baldaŭ komencos en Schaerbeek, ni nur atendas la sciigojn pri horo kaj loko de la kurso.

**Ixelles.** — La kurso de Fraŭlino Cl. Simon en lernejo de « la petite Suisse » sukcesas, kiel neniu kurso sukcesis. 240 gelnantoj diligente ĉeestas, kompreneble la afero ne estas facila por instrui tielan aŭdantaron!

**Marcinelle.** — Dimanĉon, 1<sup>a</sup> decembro, okazis en « Marcinelle » (apud Charleroi) parolado de nia sindonema amiko Cardinal.

Dank' al S<sup>o</sup> Destrée, la konata parlamentano, kiu ĉiam volonte okupas sin pri popolinstruado, la parolado okazis en la komunuma festsalono. Almenaŭ 200 personoj ĉeestis, kaj aŭskultis atentege la lertan spritan paroliston, kiu arte prezentis al la Marcinellanoj, nian belan lingvon.

Ofte oni interrompis la paroliston, aplaŭdante lin longe, precipe kiam li rakontis pri la Kembriĝa Kongreso; ĉiuj ĉeestantoj estis entuziasmitaj.

Post la parolado, S<sup>ro</sup> Destrée dankis kaj gratulis S<sup>ron</sup> Cardinal. Li anoncis malfermon de nova kurso, donota de S<sup>o</sup> Mayer, kaj multaj personoj tuj enskribiĝis.

Bonega sukceso por nia kaŭzo.

**Boom.** — Esperantista grupo fondiĝis en Boom, industriema urbo de la Antverpena provinco. La membroj estas jam dudek kaj tiu nombo baldaŭ pligrandiĝos dank' al la kurso tie organizita; la profesoro estas S<sup>ro</sup> Mathys de la grupo de Duffel.

**Namur.** — Nova grupo naskiĝis en Namur, kiu estos baldaŭ la urbo kiu havos la pli da grupoj. Kelkaj malnovaj Esperantistoj fondis ĝin; la membroj estas deksepope. La junaskita grupo organizas du kursojn; dimanĉe je la dekunua horo matene kaj sabate je la 8<sup>a</sup> vespere. La sidejo de la grupo estas ankaŭ: Hôtel de Hollande, kiel la grupo de la garnizono.

**Charleroi.** — Dank' al klopodoj de kelkaj sindonemaj adeptoj, la fondo de grupo en la Karoleĝa urbo bone prosperis kaj de nun ĝia sukceso estas certigita. De la 2<sup>a</sup> de decembro la kursoj komencis kaj 45 lernantoj alestis al la unua kunveno. La kursoj okazos ĉiulunde je la 7 1/2 horo vespere kaj ĉiudimanĉe je la 9 1/2 horo matene en la loko « Athénée Royal » (rega gimnazio) pruntita dank' al la apogo de la urbestro.

**Nivelles.** — Le 21 Novembre dernier, l'administration communale de Nivelles a mis gracieusement sa salle des fêtes à la disposition de M. le lieutenant Cardinal, notre éminent propagandiste, pour y donner une intéressante conférence intitulée « *L'Esperanto et le congrès de Cambridge* ».

M. le bourgmestre, Emile de Lalieux, très partisan de notre belle langue auxiliaire, avait donné pleins pouvoirs pour que l'annonce de la conférence fut faite au nom du collège des bourgmestre et échevins.

C'est devant un auditoire d'environ 700 personnes, que le sympathique conférencier a exprimé avec son brio habituel, tous les remarquables arguments de son discours.

M. le capitaine commandant adjoint d'État-major van de Ghinste, commandant l'école des grenadiers à Nivelles, qui avait présenté M. le lieutenant Cardinal à l'auditoire, l'a chaudement remercié après la conférence et a terminé ses paroles élogieuses par le cri de « *Espero* ».

M. le lieutenant Cardinal a eu un très gros succès et il n'y a nul doute que sa chaude parole ne porte des fruits.

Étaient présents: 150 élèves de l'école normale de l'État avec le corps enseignant, l'école des grenadiers au complet, la gendarmerie, le collège communal, des magistrats, médecins, avocats, enfin la plupart des intellectuels de la ville.

Curieuse remarque: à la sortie, des brochures de propagande en faveur de la langue étaient distribuées, bien qu'à Nivelles, aucun groupe espérantiste ne se soit encore révélé. Les brochures portaient le cachet de M. Delatte, rue St François, n° 38 à Nivelles.

**Liège.** — Une conférence a été organisée dans la Salle Académique de l'Université; M<sup>r</sup> l'avocat Jean Jongen a parlé, de « *L'Esperanto et ses avantages* ». Le groupe espérantistes, organisateur de la conférence se serait-il réveillé?

## NOVAJ GRUPOJ.

### KARLOREGA GRUPO ESPERANTISTA.

CHARLEROI.

*Prezidanto:* S<sup>o</sup> L. Delvaux, profesoro de Ateneo (gimnazio), rue de l'Athénée, 31.

*Sekretario-Kasisto:* S<sup>o</sup> D. Heyne, inĝeniera oficisto, rue Roton, 17.

*Bibliotekisto:* S<sup>o</sup> Mayer, profesoro de Esperanto en Marcinelle.

*Komisarioj:* S<sup>roj</sup> Pauly, kapitano komandanto de la 1<sup>a</sup> regimento de pelantoj (chasseurs à pied) kaj J. Hermant, kontisto.

**Nivelles.** — La 21<sup>an</sup> de l' pasinta Novembro, la urbestro de Nivelles uze-donacis afable sian belan fest-salonon al leŭtenanto Cardinal, nia bonega propagandisto, por tie fari interesan paroladon pri « *Esperanto kaj la kongreso de Cambridge* ».

S<sup>o</sup> Emile de Lalieux, urbestro, tre ŝatanta nian lingvon, estis doninta plenan permeson por ke oni anoncu la paroladon je l' nomo de la urba administrantaro.

Antaŭ aŭdantaro da 700 personoj, la simpatia paroladisto esprimis per sia kutima lerteco siajn rimarkindajn argumentojn.

Kapitano-komandanto van de Ghinste, staba adjutanto, komandanto de la regimenta lernejo de la grenadistoj, en Nivelles, kiu estis prezentinta L<sup>on</sup> Cardinal al la aŭdantaro, varme dankis lin poste, kaj finis per la krio « *Espero* ».

L<sup>o</sup> Cardinal ricevis grandan sukceson kaj, sen ia dubo, lia alloganta parolo estos fruktodona.

Ĉeestis: 150 lernantoj de la ŝtata normala lernejo, kun la instruistaro, la tuta regimenta lernejo de la grenadistoj, la ĝendarmaro, la urba administrantaro, magistratoj, doktoroj, advokatoj, granda parto el la intelektuloj de la urbo.

Kurioza rimarko: ĉe la elirejo, propagandaj broŝuroj estis disdonataj, kvankam en Nivelles neniu grupo ŝajnas ekzisti. Tiuj broŝuroj surhavas stampon de S<sup>o</sup> Delatte, rue St François, n° 38, en Nivelles.

**Liège.** — Parolado estis organizita en Akademia Ĉambro de la Universitato; S<sup>o</sup> advokato Jean Jongen parolis pri « *Esperanto kaj ĝiaj utiloj* ». Ĉu la Esperantista grupo, kiu organizis la paroladon, vekigis?

### NAMURA STELO.

NAMUR.

*Honora prezidanto:* S<sup>ro</sup> Poncelet, notario en Gedinne.

*Prezidanto:* S<sup>ro</sup> J. Detry.

*Sekretario:* S<sup>ro</sup> Verbeken.

*Kasisto:* S<sup>ro</sup> Pirsoul.

*Komisarioj:* S<sup>roj</sup> Blanjean kaj Delmelle.

*Sidejo:* Hôtel de Hollande, Namur.

### BOOMA GRUPO ESPERANTISTA.

BOOM.

*Prezidanto:* S<sup>ro</sup> Jules Clerbaut.

*Sekretario:* S<sup>ro</sup> Camille Bal, 53, Kerkstraat.

*Kasisto:* S<sup>ro</sup> Robert Spillemaeckers.

## BELGA LIGO ESPERANTISTA.

Ni ricevis el Antverpeno la sekvantan leteron: estus dezirinda ke ĉiu grupo agu same, tiel estas diri ke ĝi ekzameni zorge la nunan situacion en siaj komitataj kunvenoj kaj raportu pri la rezultato kaj opinioj al la Ligo mem. Ni nur havas kelkajn seriojn da dokumentojn, kaj ni devas ilin rondirigi; la prezidantoj de la Ligaj grupoj kiuj ne ilin ricevis bonvolu averti la sekretarion.

### Antverpena Grupo Esperantista.

Antverpeno, la 5<sup>an</sup> de Decembro 1907.

MONSIEUR LE PRÉSIDENT,

Dans sa dernière séance le Comité du Groupe Espérantiste a pris connaissance des documents qui lui ont été communiqués par Monsieur Vander Biest, et vu l'importance de la question soulevée en ce moment, il a été décidé à l'unanimité que l'on s'adjoindrait quelques espérantistes des plus compétents et que l'on étudierait la situation en commun.

Nous vous proposons de vous remettre dans trois ou quatre semaines un rapport sommaire vous exposant notre manière de voir.

Afin que le Comité de la Ligue puisse se rendre compte de l'état d'esprit de « la Belga Esperantistaro », nous nous permettons de vous proposer de demander aux autres groupes affiliés de lui faire connaître leur opinion sur les conclusions de la Délégation et sur les langues Ido et Antido.

Nous vous prions d'agréer, Monsieur le Président, l'expression de nos sentiments respectueux.

Au nom du Comité:

Le Président,

D<sup>r</sup> RAYM. VAN MELCKEBEKE.

## Comment nous voyons la Lune.

Chacun, parmi nous, a pu constater que la Lune, ainsi que tout autre astre ou constellation, nous paraît plus grosse quand elle est à l'horizon qu'au zénith: c'est-à-dire au-dessus de nos têtes, au plus haut du ciel.

D'où peut provenir cette singulière illusion?

Avant de tirer la chose au clair, un correspondant de la « *Revue Générale des Sciences* » fait quelques remarques intéressantes sur ce que nous entendons par grosseur d'un objet éloigné.

Il y a là, en effet, une notion assez vague, plutôt subjective, et qui demande à être définie.

Demandez, en effet, à cent personnes quelle leur paraît être la grosseur de la Lune.

Presque toutes vous diront qu'elles la voient grosse « comme une assiette ».

Mais insistez, en leur demandant:

— A quelle distance placez-vous l'assiette?

Elles seront probablement assez interloquées.

C'est qu'elles n'ont pas réfléchi que le diamètre apparent de cette assiette, à laquelle elles comparent celui de la Lune, n'est pas une grandeur absolue.

Il varie avec la distance qui sépare l'assiette de l'œil.

Vue de tout près, l'assiette est énorme; elle peut nous cacher le ciel entier; elle est aussi grande que lui.

Vue de plus en plus loin, elle ne nous cache qu'une partie de plus en plus petite de l'univers.

Ni ankoraŭ ricevis la sekvantan leteron:

### Al la Redaktoro de la Belga Sonorilo.

S<sup>o</sup> REDAKTORO,

Kiel Anglo, mia vidpunkto estas tute praktika. Mi ne diskutas pri la perfekteco teoria de Esperanto. Mi nur konstato *fakton*. Tiun fakton mi multfoje konstatis pro persona sperto: Esperanto estas lingvo mirinde facila. En ĉiu lando, ĉiu homo, de meza klereco, povas lerni ĝin facile kaj rapide, kaj post kelkaj semajnoj, interkorespondi kaj interparoli kun diverslandoj eĉ kun Japanoj aŭ Hindoj, li povas ankaŭ baldaŭ legi kaj ŝati, ne nur ĵurnalojn kaj Revuojn, sed ĉiujn belajn librojn de nia bela literaturo. En « *Cambridge* », dum la Kongreso, mi konstatis ke ĉiuj kongresantoj, eĉ komercantoj povis interparoli kun ĉiuj. Ĉe kelkaj oni jam rimarkis iome akcenton nacian, sed tio neniel malhelpis la perfektan interkomprenon.

Nun, kelkaj scienculoj diris ke en Esperanto ekzistas difektoj, eĉ mortigaj difektoj, sed estas diraĵoj teoriaj, ne pruvoj praktikaj.

Aliflanke D<sup>ro</sup> Zamenhof, la aŭtoro de tiu mirinda lingvo, pretendas ke: « *Fundamento neŝanĝebla estas plej necesa, antaŭ ĉio, por ke la lingvo internacia povu vivi kaj progresadi regule* ». Kaj, post sia propono, la unua Kongreso en Boulogne, starigis tiun Fundamenton. D<sup>ro</sup> Zamenhof certigas ke tiu neŝanĝebleco de la Fundamento neniel estas barilo kontraŭ la progresado, aŭ la riĉigado de la lingvo per neologismoj, k. t. p. Jen principo, kiu ŝajnas al mi, viro praktika, tre saĝa. Laŭ mi, estas *krima malsprikeco* riski la vivon de tia benaĵo por la Homaro kiel Esperanto. Do, mi kredas la Majstron, oni konfidas al la saĝeco de la aŭtoro mem de la lingvo, kiam li avertas nin per tiuj ĉi gravaj vortoj: « *La momento en kiu ni ektuŝus al tiu ĉi Principo, estus la komenco de nia morto* ».

Mi esperas ke ĉiu samideano belga, eĉ la plej humila, protestos kun mi, kontraŭ iu ŝanĝo en la Fundamento de Esperanto.

Mi restas, S<sup>o</sup> Redaktoro,

Via obee servisto,

AUSTIN RICHARDSON,

Sekretario de la Katolika Komitato, ĉe la Tria Kongreso.

## Kiel ni vidas la Lunon.

Ĉiu el ni povis konstati ke la Luno, ankaŭ ĉiu alia astro aŭ stelaro, ŝajnas al ni pli dika, tiam ĝi estas sur la horizonto ol kiam ĝi estas je la zenito: tio estas diri kiam ĝi estas super ni mem, je la plej alta punkto de l' ĉielo.

De kie elvenas tiu stranga ŝajno?

Antaŭ ol klarigi tiun aferon, unu korespondanto de la « *Generala Revuo de la Sciencoj* » montras kelkajn interesindajn rimarkojn pri tio, kion ni akceptas kiel dikecon de malproksima objekto.

Efektive, tie staras sciigo sufiĉe vaga, plivole subjektiva, kiu postulas difinon.

Demandu, ekzemple, al cento da personoj, kia ŝajnas al ili la dikeco de la Luno.

Preskaŭ ĉiuj respondos ke ili ĝin vidas tiel dikan « *kiel teleron* ».

Sed insistu kaj demandu:

— Je kia distanco vi lokigos la teleron?

Eble, ili estos iom embarasitaj.

Tio devenas ĉar ili ne pripensis ke la ŝajna diametro de tiu telero, al kiu ili komparas diametron de la Luno, ne estas absoluta mezuro.

Ĝi diversigas laŭ la distanco kiu estas inter la telero kaj la okulo.

Je la plej proksimeco, la telero ŝajnas supermezura; ĝi povas kaŝi al ni la ĉielon; ĝi estas tiel vasta kiel la blua kampo.

Vidita pli kaj pli malproksime, ĝi kaŝas al ni nur parton pli kaj pli malvastan de la universo.

Un pain à cacheter, placé à quelques centimètres de l'œil, est aussi grand que l'assiette placée à deux ou trois mètres.

C'est un effet de la perspective. Tous ceux qui ont dessiné un peu le savent bien. C'est que le diamètre apparent des choses dépend de l'angle sous lequel elles nous apparaissent et que cet angle diminue quand elles s'éloignent de nous.

Cependant, pour la grande majorité de ceux que vous interrogerez, l'assiette, vue à un pied ou à quatre mètres, aura la même dimension. C'est qu'ils tiennent compte, en appréciant cette dimension, de la distance qu'ils supputent mentalement.

Il en est généralement ainsi quand nous déterminons la dimension d'un objet placé à une distance qui est elle-même appréciable; une cheminée sur un toit, par exemple. Nous ne tenons pas seulement compte de l'angle visuel; nous nous représentons aussi la distance. Le subjectif influe ainsi sur l'objectif. Nous faisons de la géométrie comme M. Jourdain faisait de la prose, sans le savoir: et nous arrivons à un jugement — pratiquement exact — de la grandeur réelle.

Mais si l'objet est lointain, placé à un nombre de kilomètres dont nous ne pouvons nous rendre compte; et s'il a lui-même des dimensions qui nous sont inconnues, ce mode de raisonnement nous fait défaut.

Supposez qu'il s'agisse d'une tour, visible à l'horizon d'une vaste plaine. Nous sommes dans l'incapacité d'en estimer la hauteur réelle.

Et alors, par un singulier travail, nous changeons de mode d'évaluation.

Nous comparons l'apparence de la tour à celle de quelque objet proche et de petite dimension, à un bibelot. Nous dirons qu'elle a quelques centimètres seulement.

Ainsi, la Tour Eiffel, à quelqu'un qui se promène dans la banlieue de Paris, semblera avoir un mètre ou deux de haut.

Ainsi, quand on est en ballon, on voit communément les hommes « grands comme des fourmis ».

Il arrive fréquemment que, dans la description d'un bolide, l'observateur déclare que le météore paraissait avoir, par exemple, 15 centimètres de diamètre.

Or, il est absolument incapable de justifier cette opinion, puisqu'il ignore la dimension et la distance de ce bolide.

Si on veut savoir à quelle distance de l'œil il suppose placée la longueur de 15 centimètres qui lui sert de comparaison, il en prendra une tout arbitraire, et probablement trop petite.

On compare volontiers, comme je le disais, la Lune à une assiette.

Mais il faudrait que cette assiette fût très loin de nous pour justifier la comparaison. Un pain à cacheter placé à la distance de la vision distincte, de la vue normale, à 25 centimètres de l'œil, est, en réalité, beaucoup plus grand que la Lune! Il éclipe une portion du ciel trente fois plus grande que le disque lunaire au moment où il est le plus près de nous!

Cependant, il vient rarement à l'esprit de comparer la Lune à un modeste pain à cacheter! Nous la voyons comme une assiette, un fromage de Camembert, de Brie quelquefois.

Un oblato, starigita je kelkaj centimetroj de la okulo, estas tiel ampleksa, kiel telero starigita je du aŭ tri metroj.

Tio estas impresio de perspektivo. Ĉiuj, kiuj iom desegnis, tion scias tre bone. Ĉar la ŝajna diametro de la objektoj rilatas al la angulo laŭ kiu ili sin montras al ni kaj tiu angulo sin fermas kiam ili malproksimiĝas de ni.

Tamen, por la plimulto el tiuj, kiujn vi demandos, la telero, starigita je unu futo aŭ je kvar metroj, havos saman amplekson. Ĉar ili komputas, por la difino de tiu amplekso, la distancon, kiun ili memore kalkulas.

Generale tio okazas ankaŭ, kiam ni difinas la grandecon de objekto lokigita je distanco kiu estas ĝi mem komputebla; ekzemple kamentubo sur tegmento. Ne nur ni komputas la vidan angulon sed ankoraŭ ni kalkulas proksimume la distancon. La subjektivo tiel influas kontraŭ la objektivo. Ni aplikadas la geometrion kiel S<sup>ro</sup> Jourdain (teatra persono de *Molière*) verkis prozon, ne sciante tion: kaj ni konkludas juĝon — praktike ĝustan — de la reala amplekso.

Sed, se la objekto estas malproksime, starigita je nombro da kilometroj, kiun ni ne povas imagi; kaj se ĝi ankaŭ havas ampleksojn, kiuj estas por ni nekonataj, tiu racia kalkulo al ni ne estas ebla.

Imagu turon, videbla sur la horizonto de vasta ebenajo. Ni estas nekapablaj komputi ĝian realan altecon.

Kaj en tiu okazo, per stranga kalkulo, ni ŝanĝas nian manieron por taksu ĝian amplekson.

Ni komparas la ŝajnon de la turo al tiu de ia proksima objekto, kiu havas malgrandan amplekson, al ia objekteto. Ni diros ke ĝi mezuras nur kelkajn centimetrojn.

Ekzemple la turo *Eiffel*, por tiu, kiu promenas en la ĉirkaŭajo de Paris, ŝajnas alta je unu aŭ du metroj.

Ankoraŭ, kiam oni estas en balono, oni vidas la homojn kvazaŭ « malgrandajn kiel formikoj ».

Ofte okazas ke, en priskribo de bolido, la observanto sciigas ke la meteoro ŝajnis ampleksa, ekzemple, je 15 centimetroj diametre.

Tamen, li estas tute nekapabla pravigi tiun opinion, ĉar li nescias la amplekson de tiu bolido kaj ĝia distanco.

Se oni volas scii al kia distanco de la okulo li supozas lokigita la longon da 15 centimetroj, kiu por li estas la mezuro de komparo, li elektos arbitre kaj eble tre malgrandan distancon.

Oni komparas volonte, kiel mi diris, la Lunon al telero.

Sed estus necese ke tiu telero estus tre malproksime de ni por pravigi la komparon. Oblato, lokigita je la distanco de la malkonfuza kampo de la normala vido, je 25 centimetroj de la okulo, estas reale multe pli granda ol la Luno! Ĝi kaŝas parton de la ĉielo tridekfoje pli vasta ol la luna rondo je la momento kiam ĝi estas la pli proksima de ni!

Tamen, malofte oni elektas modestan oblato kiel objekton por komparo de la Luno! Ni vidas ĝin tiel ampleksan kiel teleron, fromaĝon de *Camembert* aŭ eĉ iajoje de *Brie*.

Voyez comme nous sommes victimes de nos illusions, de notre imagination aussi, et comme nous sommes déroutés pour apprécier la grandeur d'un objet dont l'éloignement nous est inconnu.

Mais revenons au rapetissement que semble subir la Lune entre le moment où elle paraît à l'horizon et celui où elle est au plus haut de sa course — et à l'explication plausible qui en est proposée.

D'abord, on fait remarquer qu'un même objet paraît d'autant plus grand que nous le projetons sur un fond plus éloigné.

Ainsi, le soir, en tramway, regardez fixement le fil incandescent d'une lampe électrique, puis, brusquement, portez les yeux sur un fond éloigné, la façade d'une maison, par exemple. L'image négative de la lampe, que vous gardez dans les yeux, pourra occuper cette façade entière.

Et puis, vous savez que la voûte du ciel nous paraît non pas telle qu'une demi-sphère, c'est-à-dire tracée en plein-cintre, mais « surbaissée », suivant un arc de cercle.

Or, à cause de cette forme prétendument surbaissée, nous jugeons l'horizon (les retombées de la voûte) plus éloigné que le zénith (la clé de la voûte).

Mais comme nous situons la Lune et les astres dans cette voûte même, nous supposons qu'ils doivent être plus éloignés aussi à l'horizon qu'au zénith.

Cependant, la Lune nous apparaît sous le même angle à l'horizon qu'au zénith.

C'est donc, en déduisons-nous instinctivement, qu'elle « doit être » plus grosse à l'horizon qu'au zénith.

Et voilà pourquoi nous la voyons telle. C'est un effet imaginaire. On le supposait bien. Mais on n'en avait pas encore donné d'explication aussi rationnelle.

Reste à expliquer d'où nous vient cette intime conviction que le ciel est une voûte surbaissée.

Elle nous vient de la disposition des nuages, apparemment.

Une couche de nuages, dont la vue nous est coupée par l'horizon, forme en réalité au-dessus de nous une voûte surbaissée. Il est aisé de représenter cela graphiquement.

Ceux qui passent au-dessus de notre tête sont — effectivement — beaucoup plus près de nous que ceux qui sont à l'horizon. Nous nous en rendons bien compte, puisque c'est au zénith qu'ils passent le plus vite, qu'ils se distinguent le plus nettement.

Depuis l'enfance, nous avons cette notion que les nuages forment au-dessus de nous une coupole aplatie.

Comme les nuages semblent eux-mêmes glisser sous la « voûte azurée », être contenus par elle, nous imaginons naturellement que le firmament a cette même forme.

Et comme les astres paraissent collés au firmament, comme les étoiles ne sont que les paillettes de la robe gros bleu de la Nuit, nous nous figurons que la distance des astres — Lune, Soleil, constellations — est régie aussi par le galbe de cette voûte, qu'ils sont plus loin de nous quand ils se lèvent que s'ils passent au-dessus de nos têtes.

(*La Gazette*).

D'ASTARAC.

Vidu kiom ni estas alprenitaj de niaj iluzioj, ankaŭ de nia fantazia imago, kaj kiom ni estas en eraro por taksu la amplekson de objekto, de kiu la proksimeco estas por ni nekonata.

Sed ni ekzameni la malgrandigon, kiun ŝajne montras la Luno de la momento kiam ĝi leviĝas sur la horizonto ĝis kiam ĝi estas je la plej alta punkto de ĝia irado — kaj la aprobeblan klarigon, kiun estas proponata.

Unue, oni rimarkigas ke sama objekto ŝajnas ju pli vasta, des pli proksima estas la supraĵo, sur kiu ni projekcias ĝin.

Tiel, vespere en tramveturilo, fikse rigardu la luman fadenon de elektra lampo, sekve, direktu rapide la okulojn sur malproksima supraĵo, sur fasado de domo ekzemple. La negativa figuro de la lampo, kiun vi konservas en la okuloj, eble atingos vastecon de la plena fasado.

Sekve, vi scias ke la arkaĵo de la ĉielo ŝajnas al ni ne tiel, kiel duono da sfero, estas diri limigita per duono da cirklo, sed kiel « premegita » laŭ elipsa arko.

Ĉar, pro tiu formo kvazaŭ premegita, ni juĝas ke la horizonto (naskpunkto de la arko) estas pli malproksima ol la zenito (klavo de la arko).

Sed, ĉar ni lokigas la Lunon kaj la astrojn en tiu arkaĵo mem, ni supozas ke ili devas esti ankaŭ pli malproksimaj sur la horizonto ol je la zenito.

Tamen la Luno aperas al ni laŭ la sama angulo ĉu sur la horizonto, ĉu je la zenito.

Estas do, instinkte ni tion konkludas, ke ĝi « devas esti » pli dika sur la horizonto ol je la zenito.

Tial ni tian ni vidas ĝin. Estas imaga efiko. Tion certe oni supozis. Sed oni ne aukoraŭ prezentis tiel racian klarigon.

Ni devas ankaŭ klarigi, kial ni havas la intiman certecon ke la ĉielo estas elipsa arkaĵo.

Tio naskiĝas pro la ordo de la nuboj, ŝajne. Nubara amaso, de kiu la aspekto estas tranĉita sur la horizonto, reale formas, super ni, elipsan arkaĵon. Estas facile montri tion desegne.

Tiuj, kiuj pasas super nia kapo estas — efektive — multe pli proksime de ni ol tiuj, kiuj estas je la horizonto. Tion ni facile akceptas, ĉar je la zenito, ili pasas la plej rapide, ni distingas ilin la plej nete.

De la infaneco, ni havas tiun konon ke la nuboj formas, super ni, platigitan kupolon.

Ĉar la nuboj ŝajnas glitadi sub la « lazura arkaĵo », ŝajnas kvazaŭ premitaj sub ĝi, ni imagas nature ke la firmamento havas tiun saman kurbon.

Kaj, ĉar la astroj ŝajnas fiksitaj al la firmamento, kiel la steloj estas nur la brilajetoj de la malpalblua robo de la Nokto, ni imagas ke la distanco de la astroj — Luno, Suno, stelaroj — estas regita ankaŭ per la kurbo de tiu arkaĵo, ke ili estas pli malproksime de ni kiam ili leviĝas ol kiam ili pasas super niaj kapoj.

Tradukis JOS. JAMIN.



Eksterlanda komerco kaj Esperanto en Belgujo.

Kvankam la ĉefa celo de helpanta lingvo internacia havas karakteron speciale idealan, estas neneigeble ke ĝia venko estos ŝuldata unue kaj precipe al la ĉiuspecaj materialaj profitoj, kiujn ĝi alportos al la homaro laborema. « Unue vivi, poste filozofi » tiu antikva sentenco estas pli ol ĉiam nuntempa verajo. Se Esperanto tiel rapide progresados, kiel ni ĝin korfunde deziras, tio ne okazos ĉar ĝi devas efike helpi al *enkonduko* de universala frateco, sed precipe ĉar ĝi plifaciligos la interrilatojn, *kiuj jam ekzistas*, inter popoloj kaj individuoj kaj sekve helpos ilian disvolvigon.

Ĉefan rolon ludos, inter aliaj, la internaciaj komercaj rilatoj, kaj ni povas antaŭdiri ke Esperanto tiom pli rapide progresados en iu lando kiom pli gravaj kaj multnombraj estos la komercaj rilatoj de tiu lando kun la ceteraj.

Aperis al ni utile montri al la legantaro de *Belga Sonorilo*, kiun servon Esperanto povas alporti laŭ tiu vidpunkto al la belga komercistaro.

Laŭ la oficiala verko « *Tableau général du Commerce de la Belgique avec les pays étrangers* » nia eksterlanda komerco atingis dum jaro 1906, peze kaj valore, jenan rezultaton:

	Kilogramoj	Frankoj
Enportajoj . . . . .	21,418,338,000	3,454,017,000
Elportajoj . . . . .	16,768,734,000	2,793,840,000
Sume . . . . .	38,187,072,000	6,247,857,000

Ĉiu lando el la mondo havas parton pli malpli grandan en tiu rezultato; ni ne povas, pro manko da spaco, citi ĉiujn, sed ni povas almenaŭ montri la gravecon de nia komerco kun kelkaj nacioj, kiuj uzadas alian lingvon ol la nia:

LANDOJ	ENPORTAJOJ (frankoj)	ELPORTAJOJ (frankoj)
Anglujo . . . . .	445,762,000	409,819,000
Argentina Respubliko . . . . .	238,291,000	66,171,000
Austrujo-Hungarujo . . . . .	13,538,000	22,215,000
Brazilujo . . . . .	31,728,000	36,206,000
Bulgarujo . . . . .	16,236,000	2,401,000
Danujo . . . . .	3,646,000	12,443,000
Germanujo (Komerca Unuiĝo) . . . . .	465,153,000	642,067,000
Grekujo . . . . .	8,711,000	8,744,000
Hispanujo . . . . .	55,821,000	35,189,000
Chili-lando . . . . .	50,446,000	27,076,000
Chinlando . . . . .	16,969,000	55,551,000
Italujo . . . . .	44,423,000	66,833,000
Japanujo . . . . .	8,081,000	21,717,000
Norvegujo . . . . .	29,493,000	11,873,000
Portugalujo . . . . .	8,042,000	12,553,000
Rumanujo . . . . .	161,380,000	27,218,000
Rusujo . . . . .	233,745,000	35,652,000
Svedujo . . . . .	34,200,000	11,702,000
Turkujo . . . . .	24,675,000	33,155,000
Unuigitaj Ŝtatoj . . . . .	299,479,000	108,363,000
Urugujo . . . . .	20,789,000	4,323,000

Cetere Belgujo estas el la nacioj tiu, kies eksterlanda komerco rilate al la loĝantaro estas la plej grava. Tion ni povas pruvi per la sekvantaj sciigoj elĉerpitaj el oficiala angla verko: « *Statistical abstract for the principal and other foreign countries* » publikigita en jaro 1906.

La jenaj ciferoj montras la suman rezultaton de la eksterlanda komerco de la diversaj aludataj nacioj dum jaro 1904 (enportajoj kaj elportajoj sumigitaj). Por faciligi la komparon, ni kalkulis ilin laŭ la nova va orunujo: la spesmilo, kiu valoras fr. 2,50.

NACIOJ	SUMA KOMERCO (spesmiloj)	LOĜANTARO	SUMA KOMERCO POR LOĜANTO (spesmiloj)
Belgujo . . . . .	1,986,190,000	7,075,000	281
Svisujo . . . . .	903,150,000	3,425,000	264
Anglujo . . . . .	8,517,500,000	42,793,000	199
Danujo . . . . .	458,180,000	2,557,000	179
Norvegujo . . . . .	245,090,000	2,300,000	107
Svedujo . . . . .	548,180,000	5,261,000	104
Germanujo . . . . .	5,793,350,000	59,600,000	97
Francujo . . . . .	3,581,320,000	39,200,000	91
Unuigitaj Ŝtatoj . . . . .	5,035,420,000	81,752,000	62
Italujo . . . . .	1,404,380,000	33,347,000	42
Hispanujo . . . . .	735,470,000	18,900,000	39
Austro-Hungarujo . . . . .	1,723,570,000	47,355,000	36
Japanujo . . . . .	726,540,000	47,350,000	16

El tiu tabelete aperigas nekontraŭdireble ke, rilate al la loĝantaro, Belgujo okupas, kiel ni suprediris, la unuan vicon en la mondo pri la graveco de l' eksterlanda komerco.

Tial ni senpacience atendas la decidon definitivan de la Delegacio por ke la belga esperantistaro povu prezenti al sia landa registaro nian karan Zamenhofan lingvon kun la necesaj perfektigoj, kiuj ebligos ĝian oficialan alprenon.

APRIDO.

PROBLEMOJ.

**PROBLEMO 8a.** — Inter urboj A kaj B estas kanalo kaj fervojo. La prezo por transporti per kanalo estas, po 1 kilometro, nur la  $\frac{6}{10}$  de l' prezo per fervojo. Sinjoro, kiu venigis de A ĝis B 120 milkilogramojn da karbo per vagonaro kaj 200 milkilogramojn per ŝipo, pagis tiom, kiom se li estus veniginta 270 milkilogramojn per vagonaro. La kanalo estas 36 kilometroj pli longa ol la fervojo. Oni demandas pri la longeco de l' kanalo kaj de l' fervojo.

**PROBLEMO 9a.** — Donu la frazon el kiu, ŝanĝinte la ordon de l' vortoj kaj la ordon de l' literoj en la vortoj, oni ricevas la jenon:

litonomr supola nuso, ŭa neigiastor  
nio lesto, ŝoropĝlhoo pre gametan

**PROBLEMO 10a.** — T E  
N O

**PROBLEMO 11a.** — Vortoj kreskantaj: Vokalo — nomo de litero — venis el kokino — granda besto — super okulo.

**PROBLEMO 12a.** — Kvadratoj radikoj:  
manĝaĵo  
promenejo  
blankaĵo.

Solvoj akceptotaj ĝis fino de Januaro 1908, ĉe la Direkcio: 53, rue de Ten Bosch, Bruxelles.

PREMIOJ.

La lasta serio da problemoj konsistis el 16. Kontentigan nombron da solvoj sendis:  
Sro Mathys 15, Fina Mabil 11, Sro Plantano 10, Sro Lundgren 9.  
Ni donacas al ili la librojn:  
Edziĝo malaranĝita de Vicente Inglada.  
Komercaj literoj de P. Berthelot kaj Ch. Lambert.  
Esperantista kantaro de L. E. Meier.  
Imenlago de Alf. Bader.

Principaux Manuels en langue française.

en vente aux dépôts de la Maison HACHETTE & C<sup>ie</sup>.

- Grammaire et exercices de la Langue Internationale Esperanto par L. DE BEAUFONT. fr. 1.50
  - Corrigé de cet ouvrage . . . . . » 0.75
  - L'Esperanto en 10 leçons par TH. CART et M. PAGNIER . . . . . » 0.75
  - Corrigé de cet ouvrage . . . . . » 0.50
  - Dictionnaire Esperanto-Français par L. DE BEAUFONT. . . . . » 1.50
  - Vocabulaire Français-Esperanto par TH. CART, M. MERCKENS et P. BERTHELOT . . . . . » 2.50
  - Thèmes d'application par L. DE BEAUFONT . . . . . » 2.00
  - Cours complet d'Esperanto, par le COMM' MATTON . . . . . » 1.50
- Tous ces prix s'entendent: port en plus.

Nederlandsche Handboeken.

- Bij den schrijver te Hilversum (Holland): Volledig Leerboek der opkomende wereldtaal Esperanto, door DREVES UITTERDIJCK, Trompschool, Hilversum: fl. 1.50 (fr. 3.25)
- Bij den drukker van *La Belga Sonorilo*, Nieuwe Wandeling, 4, Brugge: Het Esperanto in 10 lessen. . . . . fr. 0.0
- Verzendingskosten daarboven.

Publications Espérantistes belges.

Esperantaj Belgaj Presaĵoj

Ĉe: A. J. WITTERYCK, 4, N<sup>le</sup> Promenade. Bruges.

- Het Esperanto in 10 lessen, de A.-J. Witteryck 0.60
- Volledige Spraakleer van het Esperanto, de A.-J. Witteryck. . . . . 0,25
- Pagoj el la Flandra Literaturo, kolektitaj kaj tradukitaj de D<sup>ro</sup> Maurice Seynaeve kaj D<sup>ro</sup> Raym. Van Melckebeke . . . 1.50 (60 Sd.)
- Blinda Rozo de Hendrik Conscience, esperantigita de S<sup>rino</sup> Edm. Van Melckebeke-Van Hove. . . . . 1.00 (40 Sd.)
- Tra Mez-Afriko, de K<sup>to</sup> Ch. Lemaire. . . 2.50 (1 Sm.)
- Companion of the English Esperantist, by A.-J. Witteryck. . . . . 0.50
- Kelkaj floroj esperantaj, 4 broŝuretoj de A.-J. Witteryck. . . . . aparte 0.20 (8 Sd.)
- Résumé de grammaire Esperanto, d'après L. de Beaufont, par le L' Colonel de Troyer 0.25
- Esperanto à l'usage des Français, par H. Palmer 1.25

Ĉe: S<sup>ro</sup> E. MATHYS.  
urba instruisto kaj profesoro belarta, Louvain.

Manuel complet de langue Internationale Esperanto par les méthodes analytique et synthétique . . . . . 0.30

Ĉe: Madame P. DUBOIS.  
Grande Imprimerie du Centre, La Louvière.

Cours méthodique, d'Esperanto publié par «L'Instituteur Belge» . . . . . 0.65

Ĉe: W<sup>e</sup> DEMARTEAU-THYS & ZOON.  
Hasseltschestraat, 21, Tongeren.

Het Wetenschappelijk vraagstuk eener kunstmatige taal, door J. Neerdaels . . . . . 0.50

Ĉe VAN HILLE-DE BACKER.  
Zirkstraat, 35, Antwerpen.

La ĉiutaga Vivo, de S<sup>roj</sup> Swagers kaj Finet  
fr. 1.00, (40 Sd.)

Aldonu la koston de la sendo.

Ces prix s'entendent | Bij deze prijzen zijn de verzendingskosten niet gerekend.

L'ESPERANTO

solution du problème de la LANGUE AUXILIAIRE INTERNATIONALE.

Brochure de propagande.

NOUVELLE ÉDITION. 1<sup>er</sup> JANVIER 1908.

- Un exemplaire franco . . . 0.15 fr.  
10 exemplaires . . . . . 1.00 »  
20 » . . . . . 1.50 »  
50 » . . . . . 3.00 »  
100 » . . . . . 5.00 »

Clef Sommaire

pour joindre aux lettres adressées aux non-espérantistes.  
Un exemplaire . . . . . 0.05 fr.  
S'adresser par écrit, au Secrétariat de la Ligue Espérantiste belge, 53, rue de Ten Bosch Bruxelles.

## Belgaj Ligaj Grupoj.

Antverpena Grupo Esperantista.	Prezidanto: D <sup>ro</sup> RAYM. VAN MELCKEBEKE, 22, avenue des Arts, Anvers. Sidejo: Taverne Royale, 39, place Verte, Anvers.
Pioniro, Esperantista Brusela Grupo.	Prezidanto: S <sup>ro</sup> LUCIEN BLANJEAN, 83, r. du Collège, Ixelles-Bruxelles. Sekretario: S <sup>ro</sup> OCTAVE CHALON, 34, rue Van Ostade, Bruxelles.
Esperantista Societo, en Verviers.	Prezidanto: S <sup>ro</sup> EDOUARD MATHIEU, 45, rue de la Montagne, Verviers. Sidejo: 9, rue Xhavée, Verviers.
Grupo Esperantista, en Huy.	Prezidanto: S <sup>ro</sup> THIRY, commissaire-voyer, Huy.
Liera Grupo Esperantista.	Sekretario: E. O. VERMEIREN, Lierre.
Bruga Grupo Esperantista.	Prezidanto: S <sup>ro</sup> A.-J. WITTERYCK, 4, Nouvelle Promenade, Bruges.
La Semanto, Grupo en Laeken.	Prezidanto: S <sup>ro</sup> H. CALAIS, 23, rue du Chemin de fer, Bruxelles.
Grupo Esperantista, en Duffel.	Prezidanto: D <sup>ro</sup> L. JACOBS, Duffel.

## Aliaj Belgaj Grupoj.

Section Espérantiste, du Cercle Polyglotte de Bruxelles.	Prezidantino: FR <sup>ino</sup> A. GREINER, 15, Av. Brugmann, Bruxelles.
Lieĝa Grupo Esperantista.	Prezidanto: S <sup>ro</sup> E. DE TROYER, 28, Rue César Franck, Liège. Sekretario: S <sup>ro</sup> ANSIAUX, 29, rue St Gilles, Liège.
Grupo de la garnizono, en Namur.	Prezidanto: S <sup>ro</sup> BISMAR, Kapitano de la 13 <sup>a</sup> linia regimento. Sidejo: Hôtel de Hollande, Namur.
Berchema Grupo Esperantista.	Prezidanto: S <sup>ro</sup> prof. ANT. HAVERMANS. Sidejo: Café Limburgia, rue Beernaert, Berchem.
La Verda Stelo.	Prezidanto: S <sup>ro</sup> FR. SCHOOF. Sidejo: Café Zomerhof, 32, place de l'Aurore, Anvers.
Espero, Lieĝa Esperantista Societo.	Prezidanto: S <sup>ro</sup> F. SPIES, 5, rue sur la Fontaine. Sekretario: S <sup>ro</sup> G. SLOUTZKY, 34, rue Nysten.
Woluwa Blindulgrupo Esperantista.	Sidejo: Institut Royal des Sourds-Muets et des Aveugles, 72, Avenue Georges Henri, Bruxelles.
Esperanto. Cercle d'étude de langues, Spa.	Prezidanto: S <sup>ro</sup> DECO, inĝeniero, direktoro de la Banejo. Sekretario: S <sup>ro</sup> GROSJEAN.
Karloreĝa Grupo Esperantista, Charleroi.	Prezidanto: S <sup>ro</sup> L. DELVAUX, profesoro. Sekretario: S <sup>ro</sup> D. HEYNE, 17, rue Roton.
Namura Stelo, en Namur.	Prezidanto: S <sup>ro</sup> J. DETRY. Sekretario: S <sup>ro</sup> VERBEKEN. Sidejo: Hôtel de Hollande.
Booma Grupo Esperantista, en Boom.	Prezidanto: S <sup>ro</sup> JULES CLERBAUT. Sekretario: S <sup>ro</sup> CAMILLE BAL, 53, Kerkstraat.
Esperanta Sekcio du Cercle linguistique de la maison de Melle.	Prezidanto: S <sup>ro</sup> PAUL MOTTE à Melle-lez-Gand. Sekretario: S <sup>ro</sup> PAUL JANSSENS.
Seilla Grupo Esperantista en Seilles.	Prezidanto: S <sup>ro</sup> JEAN MAGIS, komunuma instruisto.
Aliaj Grupoj en St. Gilles, Malines, Andenne, Louvain, Renaix, Gembloux, Nivelles, St Trond, k. c.	

### ANNONCES COMMERCIALES DE « LA BELGA SONORILO »

Nulle publicité n'est plus avantageuse, plus profitable, mieux estimée que celle des journaux espérantistes, qui sont lus, conservés ou échangés par des milliers d'adeptes.

#### PRIX DES ANNONCES POUR UN AN :

1 page	1/2 page	1/4 page	1/8 page	1/16 page
140 frs.	80 frs.	50 frs.	30 frs.	18 frs.

Conditions spéciales suivant convention.  
S'adresser

### HANDELSAANKONDIGINGEN DER « BELGA SONORILO »

Geene publiciteit is degelijker en voordeeliger, geene is meer gewaardeerd dan die der Esperantistische bladen, die gelezen, bewaard en geruild worden door duizenden aanhangers.

#### PRIJZEN DER AANKONDIGINGEN PER JAAR :

1 bladz.	1/2 bladz.	1/4 bladz.	1/8 bladz.	1/16 bladz.
140 fr.	80 fr.	50 fr.	30 fr.	18 fr.

Bijzondere voorwaarden volgens overeenkomst.  
Men wende zich

53, rue de Ten Bosch,  
Bruxelles.

JUS APERTIS :  
**TEORIA KAJ PRAKTIKA KURSO**  
**DE STENO-METAGRAFIO**  
de L. VAN DEN BOSCH & A. CAMBY.  
2<sup>e</sup> Eldono, en franca lingvo.  
Lernolibro la plej utila por la lernado de la stenografio, la plej taŭga gvidilo por la profesoroj, la kursolibro la plej ŝatita por la lernantoj.  
Unu volumo in 8<sup>o</sup>, 134 paĝoj, bindo en angla tolaĵo.  
Kosto : fr. 1.50. Poŝte : Belglando fr. 1.60.  
Poŝta Unuigo : fr. 1.70.  
Libro de la profesoro : fr. 1.00.  
Specialaj kondiĉoj por la profesoroj.  
Aĉetebla : rue Moons, 47, ANVERS (Belglando). (78)

**La Revuo,**  
internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de  
**D<sup>ro</sup> ZAMENHOF.**  
Ce Hachette k. K<sup>o</sup>, 79, Boul<sup>d</sup> St.-Germain, Paris.  
Jare : Fr. 7. (2,80 Sm.)

**La Signo Esperantista**  
estas  
**LA VERDA STELO**  
kaj  
la verda stelo estas la SIGNO « CASSE »  
la plej bela, — malkara, — simbola kaj scia, vere disvastigita internacie rekonilo esperantista; ne estante ŝtofa, ĝi ne difektigas.  
Prezo fr. 1.00 (40 Sd.) afranke en Belgujo. Sin turni al la Administracio de la ĵurnalo.

**SPINEUX & C<sup>o</sup>, Bruselo,**  
POLIGLOTA LIBREJO, FONDITA EN 1833  
3, RUE DU BOIS SAUVAGE.  
Vendas ĉiujn esperantajn librojn.  
**KORESPONDAS ESPERANTE.**  
TELEFONO N<sup>o</sup> 3688. (89)

## Lingvo Internacia

Monata centra Organo de la Esperantistoj

48 paĝoj (13×20 cm.), nur en Esperanto.

Literatura Aldono, 16 paĝoj.

Jara abono: 7 fr. 50 (3 Sm.)

### Juna Esperantisto

MONATA GAZETO POR JUNULOJ,  
INSTRUISTOJ KAJ ESPERANTO-LERNANTOJ

Jara abono: 2 fr. 50 (1 Sm.)

ADMINISTRACIO

Preso Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

Specimnaj numeroj estas senpage riceveblaj.

**Esperantistoj !**  
AĈETU LA VINOJN KIUJN VI BEZONAS ĈE LA  
**Firmo ALFRED LAURENT-DESCOTTE**  
VINOJ  
EN SOIGNIES (BELGIQUE).  
Fondita en 1830.  
Ĉefaj vinoj de Bordeaux kaj de Bourgogne.  
Diversaj blankaj vinoj, Ĉampano, hispanaj kaj portugaliaj vinoj  
**KORBOJ**  
povantaj enteni sortimenton da 20 boteloj da diversaj vinoj  
Speciala prezo por Esperantistoj.  
Oni korespondas Esperante. — Prezaro al dezirantoj.  
Sendu la korespondatajn al  
Sinjoro **Alfred PUTSAGE-LAURENT,**  
VINOJ,  
en HOUDENG-AIMERIES (BELGIQUE). (83)

## Voyages privés et collectifs

Directeur: A. VAN DER SYP,  
Bruxelles — 76, Rue Lejranq, 76 — Bruxelles.

### SPÉCIALITÉ DE VOYAGES DE LUXE POUR NOCES

à prix réduits et à forfait, avec prolongation facultative des séjours dans chaque localité.

### VOYAGES PARTICULIERS

pour une ou plusieurs personnes, avec itinéraires et organisation au gré des voyageurs.

### Voyages collectifs pour tous pays,

accompagnés et dirigés, pour Familles et Sociétés, à partir de dix personnes.

BILLETS CIRCULAIRES. — RENSEIGNEMENTS GRATUITS.

## Sinjoro Mathouillet

ano propaganda de S. P. P. E., kaj rajthavanto de l' tre potenca firmo por burgondaj vinoj **CHAMPY PÈRE ET C<sup>ie</sup>**, el Beaune (Bourgogne), loĝos en Hôtel d'Harseamp, en Namur, de la 1<sup>a</sup> de Novembro ĝis la fino de Marto.

Li deziras trovi seriozajn agentejn en Verviers, Malines, Duffel, Hasselt, Wevelghem, Diest, Tongres, Courtrai, St. Trond. (78)

## L'Annonce Timbrologique

ĈIUMONATA ORGANO DE LA KOLEKTANTOJ

de poŝtsignoj, ĵurnaloj kaj ilustritaj poŝtkartoj

estas unu el la plej bonaj iloj por publikigo kaj por la interŝanĝantoj.

Ĝi ekzistas de 15 jaroj, kalkulas abonantojn en ĉiuj landoj de la mondo, kaj estas la OFICIALA ORGANO DE DEK FILATELAJ KAJ PRESAĴ-AMANTAJ SOCIETOJ; al ĉiuj membroj de tiuj societoj, ĝi estas sendata devige.

JARA ABONO: 2 frankoj (80 Sd.) en ĉiuj landoj.  
MALGRANDAJ ANONCOJ: 3 frankoj (1,20 Sm.)  
por 12 enpresigoj po 4 linioj.

Sin turni al la Direktoro S<sup>ro</sup> ARMAND DETHIER,  
66, rue Floris, Bruxelles, Belgique.

# La Belgique

## artistique et littéraire,

### Revue

NATIONALE DU MOUVEMENT INTELLECTUEL.

Paraissant en fascicules mensuels d'au moins 150 pages, **LA BELGIQUE** est la plus importante de nos publications périodiques. Elle publie des articles d'art, de littérature, de critique, d'érudition, etc., signés des noms les plus autorisés du monde intellectuel belge.

Tous les mois : **CHRONIQUE DES LIVRES** par M<sup>me</sup> Blanche Rousseau, MM. Paul André, Arthur Daxhelet, Georges Dwelshauwers, Ernest Mahaim, Georges Marlow, Henri Maubel, Ed. Ned, Sander Pierron, Fernand Séverin, etc.

**LES SALONS** par Grégoire Le Roy.

**LES THEATRES** par Paul André.

**LES CONCERTS** par Eugène Georges.

#### ABONNEMENT :

BELGIQUE, 1 AN : 12 FR. 6 MOIS : 7 FR. 8 MOIS : 4 FR.  
ÉTRANGER, " 15 FR. " 9 FR. " 5 FR.

**LE NUMÉRO : 1 FR. 25 CHEZ TOUS LES LIBRAIRES.**

#### BUREAUX :

26-28, Rue des Minimes, BRUXELLES.

LUEBLA.

## Internacia Socia Revuo

MONATA ESPERANTA GAZETO

Internacie redaktata kaj ilustrata pri ĉio, kio interesas la homaran vivadon.

Redakcio kaj Administracio : 45, Rue de Saintonge, Paris 3<sup>e</sup>

**Jara abono** : 6 frankoj (2.40 Sm.) (pageblaj laŭvole kvaronjare fr. 1,75 (70 Sd.)

Abonantoj-monoferantoj ; Jare *almenaŭ* 20 fr. (8 Sm.)

Por ricevi unu numeron, oni sendu 60 cent. (24 Sd.)

## The British Esperantist

Oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio ; 12 paĝoj da novaĵoj k. c. angle-esperante, kaj 8 paĝoj da Aldono. Jare 4 fr. (1,60 Sm.)

Oni abonas ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

## Internacia Sciencia Revuo

Oficiala Monata Organo de la

*Internacia Sciencia Oficejo Esperantista*

**JARA ABONO** : 2,75 SPESMILOJ -- 7 FR.

UNU N<sup>o</sup> : 25 SPESDEKOJ.

Ĉe la Administracio kaj Redakcio :

6, rue Bovy-Lysberg en Genevo (Suisse).

*Laŭ bezone, ankaŭ ĉe Administranto de La Belga Sonorilo.*

## "TRA LA MONDO"

### Tutmonda multilustrata revuo esperanta

Nuntempaĵoj ; arto, literaturo, sciencoj ; komerco, industrio militistaro, maristaro ; teatro ; sportoj ; virina kaj gejunula paĝo ; felietono ; ludoj, konkursoj kun valoraj monaj premioj.

Ĉiuj artikoloj estas verkitaj de anoj de l' landoj pritraktataj ; senpaga specimeno laŭ peto al Administranto de T. L. M., 15, Bd des 2 Gares, Meudon (S. O). France, kaj al Administranto de la Belga Sonorilo.

Oni abonas « Tra la Mondo » ĉe la belgaj, holandaj kaj danaj poŝtoŝtupoj

Postulu « Tra la Mondo » en ĉiuj francaj stacidomoj.

## Praktika Revuo de Komerciaj Sciencoj.

Redaktata en franca lingvo sub la direkto de Sinjoro O. Orban, profesoro ĉe la Universitato de Lieĝo. — Eliras ĉiumonate dum naŭ monatoj, de la 15<sup>a</sup> de Oktobro ĝis la 1<sup>a</sup> de Aŭgusto.

Unu numero : 1.00 franko. (40 Sd.)

**JARA ABONO** : Belgujo : 5.00 frankoj. (2 Sm.)

Alilando : 7.50 frankoj. (3 Sm.)

Sin turni al la Direktoro, 26, rue Basse Wez, LIEGO (LIEGE).

## L'Espérantiste.

Organe de la Société Française pour la propagation de l'Espéranto ; rédigé en français et en Espéranto. Directeur : M. L. de Beaufront, Louviers (Eure, France)

Abonnement simple . . . fr. 3.50 (1.40 Sm.)

Avec inscription à la Société fr. 4.00 (1.60 Sm.)